

Du manieroj travivi demokratismon
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 505, 1981.08.13 & 15

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum la someraj monatoj la homoj multe vojaĝas. Kion fakte serĉas tiuj vojaĝantoj?

A.- La plimulto verŝajne nur lokon por ripozi kaj sunrostiĝi ĉe la akvo. La turista denseco ĉe la bordo de maro, de lago aŭ rivero atestas, ke la homa specio estas sinbanema.

Cl.- Sed ne nur la kontakton kun la mar-, lag- kaj river-bordoj serĉas la turistoj. Ili volas vidi ion novan, emante al elmediĝo : tial ili grimpas aŭ vetaras sur la suprojn de la montoj, eniras river-kanjonojn, ariĝas ĉe la naturaj aŭ monumentaj kuriozaĵoj.

A.- Konscie aŭ ne la turistoj ankaŭ serĉas kontakton kun la loĝantaro de la traveturataj landoj, sed tiu ĉi intimiĝo ne estas tre facila. Tial, plej ofte, oni kontentiĝas je vizitado de monumentoj: ruinoj, temploj, muzeoj aŭ militmemoraĵoj.

C1.- La esperantistoj ne malsame kondutas. Sed ĉar por ili forviŝiĝas la lingvaj baroj, ili povas aldoni novan dimension al siaj vojaĝoj, tio estas la organizo de diskutadoj kun la esperantistoj de la vizitata lando. Tiuj interparoladoj, kiuj povas esti improvizitaj ĉe kafeja tablo aŭ antaŭplanitaj en la kongresa programo, se ili ne restas supraĵaj, montras kiel malfacile komprenebla estas la sinteno de popolo.

A.- Ni estas multe pli profunde markitaj, ol ni opinias, de la propra medio. Kaj tiu ĉi medio estas afero ege kompleksa. Ĝi povas esti analizita geografie, historie, politike, ekonomie, profesie, kulture, lingve, religie, folklore, finance, ktp, ktp.

C1.- Estas tutcerte karakterizaĵoj, kiuj markas la medion. En la tuta mondo la montaranoj havas tipe similajn reagojn. Religio markas ne nur siajn adeptojn, sed eĉ siajn kontraŭulojn; liberpensulo el katolika regiono ne reagas kiel liberpensulo el protestanta deveno. La historia disvolviĝo lasas multe pli profundajn spurojn ol ni imagas : En Svislando la demokratismo de apenzelano vigne malsimilas de tiu de tiĉinano. Kaj la nuntempa politika statuso de nia lando influas nian tutan personecon, eĉ se ni kredas neŭtrali rilate al politiko aŭ se ni pensas agi kiel sennaciistoj.

A.- Dum kelkaj elsendoj ni provos kompreni, kiel la politika statuso svisa markas la svisojn kaj faras de ili pense kaj sintene homojn, kiuj konceptis la nociojn komunumo, ŝtato, nacio, baloto, registaro, ktp laŭ originala maniero.

C1.- Viziti Svislandon ne nur estas malkovri la variecon de la pejzaĝoj, de la konstrustiloj, de la lingvoj. Oni ankaŭ provu intimiĝi kun la varieco de la kutimoj.

A.- Antaŭ ol komenci tiun ĉi esploradon, por bone kompreni karakterizaĵon de Svislando, ni restu je la landlimo. Ni precize elektas lokon, kiun ni bone konas, ĉe la rivero Doubs, ĵus antaŭ la akvofalo nomata Saut du Doubs: la salto de la rivero Doubs. Dekstre de la rivero situas la svisa vilaĝo Les Brenets, maldekstre la franca vilaĝo Villers. Meze de la rivero situas la landlimo inter Svislando kaj Francio. Natura landlimo, kiel oni diras en geografio politika.

Cl.- Antaŭ kelkaj jaroj veturanto tuj rimarkis la ŝanĝon de lando. La mezaj strioj sur la ŝoseoj estis blankaj en Svislando, kaj flavaj en Francio. Multaj tiaj detaletoj donis la impreson: nun mi eniris alian landon.

A.- Sed nun Eŭropo unueciĝas. Por ĉio oni alvenas al internaciaj decidoj. Unu el ili volis, ke la mezaj strioj ŝoseaj estu blankaj, kaj la francoj devis imiti la svisojn; alia volis, ke la indikilo «haltu» ne estu ronda kiel en Svislando, sed heksagona kiel en Francio, kaj la svisoj devis imiti la francojn, ktp... Baldaŭ restos nur la monaj kaj poŝtmarkaj diferencoj, se eĉ ili ne malaperos profite al eŭropa mon-sistemo. Kio do diferencigos nin baldaŭ sin demandas kelkaj.

Cl.- Fakte ne estas tiuj bone videblaj detaletoj, kiuj diferencigas nin, sed io multe pli profunda. Ni intimiĝu pli kun la vilaĝoj Les Brenets kaj Villers, kaj ni eble komprenos, en kio iliaj loĝantoj estas tre malsimilaj.

A.- Sed unue ni vidu, kio estas la similecoj.

C1.- En ambaŭ vilaĝoj la turismo ludas gravan ekonomian rolon: ŝipŝoforoj atendas la turistojn, por konduki ilin al la lago kaj al la akvofalo. Kaj hoteloj reklamas siajn menuojn. La aliaj vivgajnaj okupoj, krom la laktoproduktado kaj arbarekspluatado estas laq horloĝindustrio kaj la etmekaniko.

A.- Ambaŭ vilaĝoj havas multe da rilatoj komercaj. La doganistoj scias, ke la **Brenets**-anoj iras Francien por akiri alkoholon, viandon kaj pneŭmatikojn, dum la **Viller**-anoj iras Svislanden por aĉeti benzinon, ĉokoladon kaj filmojn, ktp.

C1.- Sed hejme la **Brenets**-anoj aŭskultos la televidajn novaĵojn venantajn el Svislando, dum la **Villers**-anoj orientiĝos al Francio. Apenaŭ unu kilometro disigas tiujn ĉi hejmojn, kies loĝantoj rigardas en precize malsamajn direktojn, ĉu ili estas svisoj, ĉu ili estas francoj.

A.- Same estos por multaj vivdetaloj: la elekto de sia taggazeto, la interesiĝo al la politikaj aferoj, la maniero eĉ koncepti la politikan vivon.

Cl.- Tio estas tuj videbla en konversacio. Kiam **Brenets**-ano parolas pri la ŝtato, li vidas sian kantonon, la landeton Neuchâtel, kies ĉefurbon li ofte vizitas, ĉar ĝi situas je distanco de apenaŭ tridek kilometroj. Sed kiam **Villers**-ano uzas tiun saman vorton ŝtato, li vidas la tutan landon Francio kaj ties ĉefurbon Parizo, kiu foras je pluraj centoj da kilometroj.

A.- En la menso de la **Brenets**-ano la nocioj **ŝtato** kaj **nacio** estas bone disigitaj: lia ŝtato estas la kantono **Neuchâtel**, nacie li estas sviso. La **Villers**-ano utiligas ilin sinonime: la ŝtato kaj la nacio estas Francio. En liaj gazetoj la ŝtatigo de industrio estos nomata naciigo.

C1.- La loĝantoj de ambaŭ vilaĝoj travivas demokratan vivon. Sed la maniero travivi ĝin estas ege malsimila. La komunumo **Les Brenets** funkcias preskaŭ memstare, kiel ŝtateto en kiu mankus nur la justicaj instancoj, dum la komunumo **Les Villers** estas antaŭ ĉio administra divido hierarkie dependanta de la departementa aktiveco.

A.- **Brenets**-ano. kiu konstruas aŭ transformas domon simple rilatas al la konstru-fako de sia komunumo por submeti siajn projektojn. La **Villers**-ano tuj parolos al vi pri Parizo, el kie devas veni permeso agi, aŭ subvencioj. Estas tre malsimilaj situacioj, kiuj konstante sin trudas, kaj faras de ni, objekte kaj subjekte, pli malsimilajn civitanojn ol ni pensas. La

svisaj **Brenets**-anoj estas anoj de federacio, la francaj **Villars**-anoj estas civitanoj de forte centralizita lando.

C1.- Pri la pens- kaj ag-maniero en federacio ni parolos dum la venontaj semajnoj. Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*